GISTO por la Verda Kafo, 280899.
Poŝtkesto, 126
95760-000 Kaiurbo-RS

Karaj gekompanoj ! - Kvankam, laŭ mi scias, ĉiu estas posteulo de latinidaj gepatroj, ĉiuj sin montras pli fridaj ol pingvenoj, rilate al miaj tekstoj malgraŭ ke kelkaj instigis al reago. Hodiaŭ mi provas iomete levi la humoron per kelkaj anekdotoj, ĉerpitaj el pluraj publikigaĵoj.

SOLVO

Dommastrino, koleregа eniras en dungejon de servistinoj kaj laŭte protestas. Friponan servistinon vi sendis al mi. Post unu semajno ŝi forkuris kun mia edzo – Ne tro gravas, diris la virino kiu tie deĵoras kaj tuj tiras ŝlipon el stako de kandidatoj. Surestas foto de ĉarma blondulino. Ŝi aldiras: mi garantias ke via edzo baldaŭ revenos.

AŬDENDA

Amiko demandas - Ĉu vi ĝuas feliĉan edzecon ? – Jes. - Do, kion vi diras al edzinjo kiam vi, post bierumada vespero, drinka enhaveniĝas hejme? - Nenion... ŝi diras ĉion.

EN BARBIREJO

Juna barbiro fuŝe razas klienton. La klingo estis malsufiĉe akra. Fininte razi, la kliento longe alrigardas sian vizaĝon en spegulo, iom da sango videblis. La barbiro iel pardonpete demandas – Ĉu doloras ? La kliento rediras – Ne, sed mi timas ke kiam mi trinkos la akvo elfluos tra la tranĉvundoj !

EN TRAJNO

Eleganta sinjorino haste entrajniĝis kaj veturas en la kupeo. Kunvojaĝas aro da snobaj junuloj, bruas, fumadas kaj ellasas densajn nubojn da fumo. Ŝi ne plu eltenas kaj, deprimite, demandas al unu el ili – Ĉu ĉi vagono estas unua klasa ? Afable la knabego jesas kaj ŝi – Ah jes ?, mi havas la impreson ke ĝi estas la lokomotivo...

HEJMAJ PROBLEMOJ

Alveninte hejme, frumatene, kapturniĝe ebria, la viro tre zorge paŝis, por ke edzinjo, kiu dormas aŭ almenaŭ ŝajnas tiel, ne rimarku lian envenon. Li enlitiĝis kaj baldaŭ endormiĝis. Sekvan matenon lia edzino demandas lin - Je kioma horo vi revenis lastan nokton ? - Je la deka, respondis li flegme -Je la deka?... sed mi aŭdis la horloĝon sonorindiki la unuan... - Kaj vi pretendas ke ĝi indiku ankaŭ la nulon ??



George Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 S.S.Caí-RS – Brazil.
15.08.99.

Sr°. SAI BABA
Andra Pradeshi
Suda Hindio.

Altestimata Sinjoro,

Manke de sufiĉa kono pri la angla lingvo, mi uzas la internacian kaj esperas ke vi facile komprenos mian tekston.

Via famo disvastiĝas rapide en Brazilo, per libroj, per la Preso. Tio igas min fariĝi admiranto via kaj samtempe kuraĝigas min skribi al vi. Oni sciĝas ke nenion, rilate al via personeco, vi malscias. Plurmiliona adeptaro de la lingvo neŭtrala ŝatus ekscii vian opinion, kiel pli saĝe agi, por pli rapide kreskigi la Esperanto-movadon en la tuta mondo. Laŭ mi, oni akcele marŝas al unu registaro por la tuta Tero kaj konjekteblas ke ĝi trudos la malfacilan, tute malregulan anglan lingvon al la Homaro. Damninda afero se ekzistas solvo preta, de pli ol cent jaroj, en plena uzado, en minimume 115 landoj. - Tutkore mi riskas peti de vi konsilon kaj helpon por ke la movado favora al neŭtrala lingvo facile prosperu, malhelpe al klopodo kiu volas enkonduki nacian lingvon, malrespekte al la Universala Rajto de Homoj, inkluzive de lingvoj, far UNO/UNESCO.

Respektoplene salutas,

George Otto Vaske

Noto – Traduka ebleco : Dr°.Probal Daŝgupto
Telefono hejma: (040)301.1901 - Oficejo: (040)301.0161 (Andra Pradesh)

KURIOZAĴO.

Jen interesa kontribuaĵo de nia tre kara, aktiva kaj diligenta R. Zaghetto, taŭga por pensigi lingvolernonton, antaŭ ol li/ŝi decidis eklerni la germanan. Same kiel en Esperanto kaj la angla, la germanoj ankaŭ metas la ĉefan ideon en la fino de kunmetita vorto. Endas klarigi ke la aglutinaĵo estas el vortoj ne tute ĝuste tradukitaj,cele. prezenti ekzemplon de vorto tiom longa. - Beutelratte estas ne Kanguruo sed jes didelfo - Lattengitter = krado el latoj, ne el maŝdrato - Atentater = atencanto, ne murdisto - Stotter=gago, ne muta - Trottel = malsaĝa, ne surda.. - Jen do la fortimiga vortego kiu rezultis el la kunmetaĵo, ebla sed apenaŭ tolerebla, kies signifo(laŭ la ekzemplo) estas: assassino da mãe do garoto surdo e mudo. En vere: atencinto kontraŭ la patrino de la surdmutulo ... sen citi ĉiujn ideojn arigitajn ...stuporiga rimedo kontraŭ naciaj lingvoj:
Hottentottersottertrottelmutterlattengitterkotterbeutelrattenatentater...hi... hi...hi !!!